

La Riverego

MeKaRo en Toronto	2	Sovaĝaj bestoj	17
NASK revenas al Raleigh	3	Malpli oftaj vortoj	19
Sekretoj de la malnova ĉefurbo	5	Mongolio, mia amo !	20
Pripensoj de ne-Esperantisto	14	Kalendaro	25



Kioto : la sekretoj de la malnova ĉefurbo

Kyoto : les secrets de l'ancienne capitale

MeKaRo-2015 : ĉu ankaŭ vi ?..

La Mez-Kanada Renkontiĝo de Esperanto (MeKaRo) estas turisma semajnfino, kiu okazas ĉiujare alterne en Kebekio kaj en Ontario dum la longa semajnfino en majo. Ĝin organizas la Esperanto-Societo Kebekia kaj lokaj Esperanto-kluboj en Kebekio kaj Ontario. Post kvin jaroj jen denove la vico de la Esperanto-Rondo de Toronto transpreni la torĉon kaj fari plian sukcesegan eventon en la plej granda urbo de Kanado ! 58 homoj jam aliĝis. Ĉu ankaŭ vi ?!



Ni vizitos la faman Kensington Market...



Ni ĝuos la mirindan naturon de Toronto-insuloj...



Ni salutos la fantomojn el Toronto...



...kaj MeKaRo ne estus MeKaRo sen biero, ĉu ne ?

NASK revenas al Nord-Karolino kaj kunigas fortojn kun Kino-Teatro-Festivalo

En 2015 NASK revenos al la Universitato William Peace in Raleigh, Nord-Karolino, kaj ĝi kunigos la fortojn kun Kino-Teatro-Festivalo (KTF) por liveri esceptan eventon, eble, la plej preparolatan en la historio de la kursaro !

La Nord-Amerika Somera Kursaro (NASK) estas unika intensa enmerga programo en Esperanto kiu altiras studentojn kaj profesiajn instruistojn el la tuta mondo. Dum sia 45-jara historio, NASK okazis en multaj lokoj : en San-Franciska Ŝtata Universitato ĝis 2002, School for International Training (SIT) en Brattleboro (Vermonto) en 2002-2006, kaj en la Universitato de Kalifornio en San-Diego en 2007-2011. Ekde 2012, ĝi vojaĝis kun usonaj landaj kongresoj al diversaj lokoj : al Universitato de Teksaso en Dalaso en 2012, al Universitato William Peace en Raleigh (Nord-Karolino) en



2013, kaj al Universitato de Viktorio (Kanado) en 2014. Ĉi-jare NASK revenas al la bela verda kampuso de Universitato William Peace en Raleigh por liveri plian neforgeseblan sperton !

La unuaj kvar tagoj de NASK koincidos kun la dua Kino-Teatro-Festivalo (KTF), post la granda sukceso de la unua KTF pasintaprile en Vaŝingtonio. Aldone al la kutimaj NASK-aktivaĵoj, okazos posttagmezaj amuzaj kreaĵ metiejoj, por lerni, ekzemple, la bazojn

de filmado kaj helpi al partoprenantoj fari sian propran videon. Estos multe da okazoj ĝui, renkonti novajn amikojn, fari diversajn

interesaĵojn, lerni kaj dividi la sciojn kun aliaj personoj. Se vi jam pripensas iun projekton, vi trovos kunlaborantojn, sed vi povos ankaŭ ĝui kontribuante vian sperton al projektoj de aliaj.

NASK okazos ekde la 30-a de junio ĝis la 9-a de julio 2015 (KTF : ekde la 30-a de junio ĝis la 5-a de julio) : jen ok tagoj da lernado, amuziĝo kaj artoj, esplorado de la belaj muzeoj, restoracioj kaj butikoj de la urbo, ĉio en promendistanco de la kampuso, plus la ŝanco partopreni la festadon de la 4-a de julio, kun piroteknikaĵoj, kaj, plej grave, vidi la finan produkton de la KTF-metiejoj ! Paul Gubbins, membro de la Akademio de Esperanto kaj aŭtoro de multaj verkoj, inkluzive de la videa kurso “Esperanto — Pasporto al la Tuta Mondo”, instruos la superan kurson. Lee Miller, profesia interpretisto de la Usona Signo-Lingvo, instruos la meznivelan kurson, kaj Ĵenja Bondelid (« Helena »

el « Esperanto — Pasporto al la Tuta Mondo »), koregrafo kaj balet-instruistino, gvidos la komencintan kurson. Oni povas enskribiĝi por la tuta programo (plena NASK + KTF, 8 tagoj) aŭ nur por la unuaj kvar tagoj de la evento (NASK + KTF, 4 tagoj). La bazaj prezoj varias ekde 175 \$ (sen loĝado, 4-taga programo) ĝis 735 \$ (plena prezo, kun loĝado kaj manĝado, 8 tagoj). Aliĝu ĝis la 15-a de aprilo por ricevi la plej bonan prezon !

Vidu pli da detaloj pri NASK, kun aliĝilo, ĉe nask.esperantic.org kaj pri KTF ĉe : kotofesto.org/ Kontaktu Ellen M. Eddy, NASK-administranton (EDDYELLEN@aol.com), se vi havas demandojn. Spektu videeton pri NASK-2013 en Nord-Karolino de Fabjo Monteĵro ĉe youtu.be/UbnxwKbpf2I (aŭ klaku sur unu el la subaj bildoj)

[el esperantic.org]





La sekretoj de la malnova ĉefurbo

Ĵenja Amis

Avec l'article sur Kyoto — Kyoto, la mystérieuse Ville aux dix mille temples et ancienne capitale impériale du Japon — notre rédactrice achève sa série japonaise de deux ans. Adieu, Japon ! Ou, peut-être, à la prochaine !

Nia dusemajna restado en Kioto estis plena je renkontiĝoj kun esperantistoj, hazardaj konatiĝoj, vizitoj al nur kelketaj el la miloj da temploj kaj sanktejoj en Kioto, kromnomita La Urbo de Dek Mil Temploj (oni bezonus la tutan vivon por vidi ĉion !) kaj malkovro de diversaj misteroj, kiujn kaŝas tiu antikva urbo. Por malkovri ilin oni devas esti pacienca kaj atentema... kaj havi lokajn esperantistajn amikojn, kiuj helpas al vi penetri la sekretojn de la malnova imperia urbo. Ni estis tre bonŝancaj en tiu rilato : s-ino Tahira denove bonkore akceptis nin en sia bonveniga domo.

La vizitantoj neniam mankas en Kioto, sed estas du tempoj de la jaro, kiam en Kioto malfacilas trovi lokon en hoteloj kaj kiam la prezoj por aviadbiletoj subite altiĝas : en printempo — en kelkaj nekredeblaj tagoj de printempo, kiam la urbon kovras la roz-blanka abundo de la sakurafloroj, kaj en novembro, kiam la urbo kaj la ĉirkaŭaj montoj fariĝas belega miksaĵo de flame ruĝaj kaj ore flavaj aŭtunaj koloroj. En tiu tempo la templojn kaj sanktejojn inundas kaj turistoj, kaj lokanoj, ofte vestitaj per belegaj kimonoj por ne maltrafi la okazon fotiĝi sur la belega fono de multkoloraj folioj. Sed eĉ en tia okupata sezono ni



estis bonŝancaj ricevi lokon en la fama kaj preskaŭ ĉiam okupata « Esperanto-hotelo ĉe Tahira » : nia gastigantino Masako Tahira ne havis multe da tempo por ripozi inter la gastoj : la antaŭaj vizitantoj

foriris en la mateno de la sama tago, kiam ni alvenis !

La unua sekreto, kiun malkovrigis al ni nia gastigantino estis la ŝlosilo por malkovri ĉiujn ceterajn sekretojn de la urbo : kie oni povas aĉeti malmultekostajn busbiletojn ! La malgrandaj oficejetoj, kiuj vendas la rabatitajn tagajn buskartojn, havas neniun ŝildon en la angla, kaj en mia gvidlibro oni eĉ ne mencias la eblon aĉeti tiajn biletojn. Atendante mian edzon kaj nian gastigantinon ekstere apud tia et-eta oficejo, kun la spaco apenaŭ sufiĉa por du personoj, mi kaptis la suspekteman rigardon de iu viro. Li rigardis min surprizite, kvazaŭ kaptinte min fari ion kontraŭleĝan. Finfine, lia scivolemo fariĝis tro forta kaj li demandis min en sufiĉe komprenebla

angla : « Kiel vi scias pri tiu loko ? Nur la lokanoj venas ĉi tien ! » Antaŭ ol mi malfermis la buŝon por respondi, li vidis mian edzon eliri kun nia gastigantino : « Ha, vin akompanas japano ! », li diris kun kompreno.

Persona diservo

« Ĉu vi povis imagi antaŭe, ke oni faros tutan diservon speciale por ni ? », mi demandas al mia edzo, Joel, elirante el la anglikana preĝejo Sankta Maria en Kioto. Nature timida, Joel eĉ ne volis eniri tiun preĝejon, kiun ni malkovris hazarde, vagante tra la urbo en dimanĉa mateno, kaj vidinte ŝildon, ke oni tie proponas ankaŭ anglalingvan meson (li forte suspektis, ke ni estus la solaj eksterlandaj gastoj, kaj tial estus centro de



atento). Lia preteksto estis, ke li nek portis bonajn vestaĵojn, nek estis razita (mi havis la ideon iri tien dum nia frumatena promeno — do li ne povis « ĝuste pretigi » sin). Finfine, mi konvinkas lin eniri : « Vestaĵoj ne gravas, kaj ni ne devas resti longe nek paroli kun aliaj homoj, se vi ne volas ». Ni eniras la malgrandan novan brikan, belan lumplenan preĝejon kun elegantaj mozaikaj vitraloj. Surprize, ni aŭdas neniun konversacion. Joel nerveze rigardas la enirpordon kaj jam pripensas la eskapon, timante, ke ni estas la solaj vizitantoj, sed mi ne cedas : « Ni jam estas ĉi tie kaj ni restos, ĉu ni estas la solaj vizitantoj aŭ ne ». Kiel en ĉiuj japanaj domoj, ankaŭ ĉe la enirejo de la preĝejo oni zorgeme metis por vizitantoj *surippa* — pantoflojn (de la japana prononco de la angla vorto « slipper »). Enirinte la ĉefan halon de la preĝejo, ni konstatas, ke Joel ja pravis en siaj suspektoj : ni estas solaj vizitantoj ! La diservo okazas en la angla lingvo, gvidate de mezaĝa pastro kun longa barbo, helpata de



Michael Takehisa Fujiwara ŝatas pentri ikonojn en ortodoksa stilo kaj fari *manga*-desegnetojn por infanoj



Gitarludante dum la diservo... Kaj kial ne ?

juna lernanta pastro (ambaŭ japanoj). La ceremonio estas mallonga, sen prediko kaj kun nur unu kanto, kiun la pastro mem ludas per gitaro.

Babilante en miksaĵo de la angla kaj la japana kaj kunmanĝante post la diservo, ni ekscias, ke havi nur unu-du vizitantojn por la matena diservo estas sufiĉe ofta afero : por kutima dimanĉa diservo, japanlingve, venas ĉirkaŭ kvindeko da homoj, kaj por specialaj okazoj, kiel Kristnasko — ĉirkaŭ cent. La juna helpanta pastro Sebastiano diras kun ioma bedaŭro, ke la vizitantaro ŝrumpas, ĉar la nombro de kristanoj en Japanio ĝenerale malkreskas : se antaŭ kelkaj jaroj ilia nombro estis ĉirkaŭ unu procento, nun, laŭ li, ĝi falis ĝis 0,7 %. La nombro de anglikanoj en Japanio ne aparte grandas : ĉirkaŭ sesdek mil, laŭ Monda Konsilio de Eklezioj, kaj nur 30 mil, laŭ Sebastiano mem

(interesa koincido : la japana anglikana eklezio ekzistas en Japanio ekde la naskiĝjaro de Esperanto : 1887). « La homoj, kiuj iras regule al la preĝejo, estas la generacio de *oba-ĉan* kaj *oĵi-ĉan* (avinoj kaj avoj) : la junuloj ne emas iri al la preĝejo aŭ entute komunikiĝi kun aliaj homoj, preferante komputilludojn kaj sociajn retejojn », diras li, mem tre juna kaj preskaŭ ĉiam kun la rigardo algluiĝinta al poŝtelefono — tamen, ne por retumi, sed por serĉi la ĝustan anglan vorton en la vortaro. Sebastiano ne venas de kristana familio — li konvertiĝis al kristanismo post konatiĝo kun anglikana pastro. Li estas samtempe unua kaj dua generacio de kristano : « Post mia kristaniĝo, ankaŭ mia patrino konvertiĝis », li diras fiere. Li klarigas al ni, ke la preĝejo estis konstruita en la jaro 2000, kvankam la kongregacio estas multe pli malnova : oni devis detruigi la originalan preĝejon, post kiam ĝi estis severe damaĝita pro la tertremego en Kobe en 1995, kiu damaĝis multajn konstruaĵojn ankaŭ en Kioto.

Sanktejo de prospero

Se por vidi diversajn templojn de Kioto necesas plurajn jarojn, por vidi ĉiujn filiojn de unu el la plej grandaj ŝintoismaj sanktejoj, Fuŝimi-Inari Taiŝa, ne sufiĉos eĉ unu vivo, ĉar en la tuta lando troviĝas dekoj da miloj da Inari-sanktejoj. La ĉefsidejo de



Vulpo : simbolo de la dio Inari

tiu sanktejo troviĝas apud Kioto, kaj ĝia vizitkarto estas la tunelo el pluraj miloj da ruĝaj pordegoj — *torii* : donacoj de diversaj firmaoj kaj individuoj, por elvoki la favoron de dioj al sia familio aŭ sia entrepreno. La tereno de la sanktejo estas tiom enorma, ke eĉ en la pinta ruĝfolia sezono, kiam turistoj kaj lokanoj aparte multas, estas facile trovi preskaŭ senhomajn lokojn, irante al la supro de la Inari-





monteto laŭ la senfinaj torii-tuneloj.

Vojaĝante tra Japanio, ni vidis du tre strangajn filiojn de Inari-sanktejo :

ambaŭ troviĝis sur la tegmento de aliaj konstruaĵoj — unu super alkoholvendejo, kaj alia super granda ĉionvendejo. « Nu, estas almenaŭ unu homo, al kiu ĝi ja helpis fariĝi riĉulo, nome, la posedanto de la alkohol-vendejo en la suba etaĝo » ŝercis niaj amikoj el Hiroŝimo : la sanktejo altiras homojn, kiuj venas preĝi por riĉiĝi, kaj kelkaj el ili certe iras suben aĉeti alkoholaĵojn. Kaj se la sanktejo ne helpis riĉiĝi... nu, oni simple aĉetu la specialaĵon de la vendejo — la « mon-sakeon » — kaj simple dronigu la malfeliĉojn en la alkoholo ! ☺

La Inari-sanktejo sur la tegmento de ĉionvendejo estas starigita ne por riĉiĝi, sed por... ne plu malriĉiĝi : ĝin starigis la estro de la entrepreno, kiu volis, kun la helpo de dioj, malgrandigi la financajn problemojn de la entrepreno (al la furiozo de ĝiaj laborantoj, kiuj atendis de la

direktistoj pli tradiciajn agojn, kiel ŝanĝojn en la strategia direkto).

Palaco sen nord-oriento

La domo de s-ino Tahira troviĝas en piedira distanco de la imperiestra palaco, kiu situas en grandega parko kaj okupas plurajn kvartalojn de la urbo. Ekde la 12-a jarcento ĝis la fino de la 19-a jarcento tie situis loĝejoj de japanaj imperiestroj, kaj eĉ post la movo de la palaco al Tokio, la entronigaj ceremonioj de la du antaŭlastaj imperiestroj okazis en tiu palaco en Kioto. Kiel ni eksciis, la japanoj kiuj volas viziti la imperiestran palacon en Kioto, devas rezervi la lokon duonjaron antaŭe, dum la turistoj, kiel ni, devas



mendi la bileton nur semajnon antaŭe kaj simple alveni je la indikita horo kun pasporto (je mia granda surprizo, neniu eĉ kontrolis la enhavon de niaj dorsosakoj !).

La japana imperiestra palaco estas sufiĉe modesta kompare kun la reĝaj palacoj en Eŭropo : grandaj malplenaj spacoj, minimumisma dekoro, nefarbata ligno, lagetoj kaj ŝtona ĝardeno. La sola afero, kiu distingas la palacon disde aliaj konstruaĵoj, estas belegaj tegmentoj el tavoloj de cipresa ŝelo : leĝera kaj fleksebla, ĝi ankaŭ elstare protektas kontraŭ la pluvo. « Oni bezonas 25 jarojn por ŝanĝi la cipresajn tegmentojn sur ĉiuj konstruaĵoj de la palaca komplekso, kaj tuj kiam oni finas ŝanĝi la tegmentojn... estas la

tempo rekomenci ! », diras la ekskursgvidantino, aldonante, ke nur la imperiestra palaco kaj kelkaj temploj kaj sanktejoj havas la rajton uzi cipresajn

ŝelojn por siaj tegmentoj : en la antikva tempo eĉ la ŝogunoj devis peti la permeson de la imperiestro por povi uzi cipresan ŝelon por siaj domoj. La ĉiĉeronino ankaŭ altiras nian atenton al angulo de la palaco, kiu estas kvazaŭ eltranĉita, kaj same estas eltranĉita ankaŭ la nord-orienta angulo de la murego ĉirkaŭ la palaco : « En la japana tradicia kulturo oni konsideras nord-orienton malbonŝanca direkto, kaj en la montoj direkte al la nord-orienta flanko de la imperiestra ĝardeno eĉ troviĝas sanktejo, kies speciala rolo estas protekti la imperiestran palacon de la « malbona influo » de tiu direkto.





Unu el la enirejaj pordegoj al la palaco



La eltranĉita angulo de la murego ĉirkaŭ la palaco

Submergiĝa sperto

Se oni vizitas Japanion vintre, oni lernas unu gravan aferon : la japanaj domoj ne estas bone izolitaj kaj plejparte ili ne havas centran hejtan sistemon : ne estas malofte vekiĝi matene kaj vidi sian propran spiron, ĉar la temperaturo ekstere kaj la temperaturo interne povas esti pli-malpli samaj. Ni eksciis, ke ankaŭ la imperiestra loĝejo ne estas escepto : la konstruaĵo estas farita el maldikaj, facile kunmeteblaj lignaj tabuloj, kaj ĝi lasas la malvarmon kaj venton facile eniri en la domon. « La japanaj domoj estas konstruitaj por somero, ne por vintro », ni aŭdis plurfoje en Japanio, kaj jes, eĉ la imperiestroj devis suferi pro la malvarmo en la domo ! Tamen, estas ankaŭ bona flanko de tio : nenio sentiĝas tiel bone, kiel la submergiĝo en varmega akvo en unu el la frostaj vintraj tagoj : ĉu en via propra hejmo (*ofuro*) aŭ en publikaj lokoj — la naturaj fontoj de minerala akvo (*onsen*), tiom abundaj en la lando pro la japana geologio —, aŭ en publikaj banejoj : *sentoo* (malsame al la nature varma akvo en *onsen*, ili uzas varmigitan akvon).



Enirejo de publika banejo en Kioto

Nuntempe multaj publikaj banejoj malaperas, simple ĉar novaj domoj ĉiam havas banejojn, kio ne estis kutima antaŭe. La restantaj banejoj en la batalo por la ŝrumpanta klientaro en Kioto proponas al la publiko pli kaj pli da servoj, je ne tre alta prezo fiksita je ĉirkaŭ kvin dolaroj, kiun la posedantoj ne rajtas altigi. La naturaj akvofontoj kutime kostas iomete pli ol la kutimaj publikaj banejoj (6-10 \$) kaj ili estas pli belaj kaj kutime multe malpli grandaj ol *sentoo*. Kvankam iuj iras al publikaj banejoj simple por baniĝi, por multaj ĝi estas multe pli ol tio : malstreĉiĝo en la minerala akvo, akvaj masaĝoj, banoj kun diversaj aromaj herboj, aŭ eĉ banoj kun

elektro (strikte malpermesataj al homoj kun korproblemoj). Malsimile al eŭropaj varmaj fontoj, kie oni kutime portas bankostumon kaj kie la viroj kaj virinoj estas kune, en Japanio oni ĝuas la varmajn fontojn sen vestaĵoj : viroj kaj virinoj en apartaj ejoj (eĉ se antaŭ la Dua Mondmilito en Japanio ekzistis miksitaj banejoj : dum la usona okupacio ili estis malpermesitaj, ĉar la usonanoj konsideris miksitajn banejojn malmoralaj). La unua fojo en japana *onsen* estas sufiĉe stranga sperto por multaj nord-amerikanoj, ĉar oni simple ne kutimas esti sen vestaĵoj en publika loko. Iam mia edzo tre amuzis min per demando : « Ĉu virinoj ofte parolas dum ili komune baniĝas ». « Jes, ili parolas. Kial ? » « Viroj neniam parolas dum ili baniĝas » — li diras — kaj tuj aldonas : « sed foje ni en la vira flanko aŭdas virinojn paroli kaj foje viroj eĉ krias por respondi al la demando de edzino, kiam la edzo finas la banon ».



La urbaj simioj

Eĉ se ni ne bonŝancis baniĝi en varmaj fontoj kun simioj (kvankam eĉ tio eblas !), ni ja bonŝancis vidi la japanajn simiojn : kelkajn en la naturo, kaj kelkajn en la fama simia parko Iŭatajama apud

Kioto — hejmo de ĉirkaŭ 150 sovaĝaj simioj. La inteligentegaj japanaj makakoj (aŭ neĝaj simioj) estas la sola simia specio, kiu loĝas tiom norde, kiel Japanio. La afiŝo ĉe la enirejo de la parko avertas la turistojn pri la gravaj reguloj : ne tuŝi simiojn, ne preni la falintan manĝaĵon de sur la tero, ne fiksigardi en la okulojn de la simioj,

formeti la plastajn sakojn en alian sakon aŭ lasi ilin ĉe la akceptejo (se ne, estu avertita, ke la simioj povas forpreni ĝin), kaj teni distancon de almenaŭ unu metro de la simioj (« Ĉu vere oni povas alproksimiĝi al la simioj tiom proksime ? », mi demandas min enirante la parkon ?). Post mallonga promeno al la monto, ni alvenas al la supro de montplataĵo kun nekredibla vido al la

tuta urbo kaj... almenaŭ trideko da simioj kaj simiidoj libere promenataj, grimpantaj la arbojn kaj diversajn instalaĵojn, tenere karesantaj unu la alian kaj tute ignorante la ĉeeston de ni, homoj. Ŝajne, por tiuj simioj ni estas simple parto de la kutima pejzaĝo, io simila al moviĝantaj arboj. « Ŝajne, la simioj ne legis la regulojn pri la unumetra distanco », mi ŝercas, ĉar ili alproksimiĝas al vi je la distanco de nur kelkaj centimetroj, sed estas grave ne fari rapidajn movojn por ne surprizi aŭ timigi la bestojn. En la parko oni eĉ povas aĉeti arakidojn kaj tranĉitajn pom-pecojn por manĝigi la bestojn el la sekureco de ligna dometo, tra la fenestroj kun baroj. Tre amuzis nin spekti, kiel etaj simiidoj prenas unu pecon de arakido, zorge forprenas la ŝelon kaj malrapide manĝas ĝin, dum la grandaj simioj provas preni de vi samtempe tiom da arakidoj, kiom povas enteni ilia buŝo kaj rapide forkuras al sekura loko. Jes ja, la saĝeco venas kun la aĝo ankaŭ por niaj parencoj-simioj !



Jen venas al la fino mia du-jara japana serio... kaj mi konstatas, ke mi rakontis nur etan parton de ĉiuj niaj japanaj aventuroj, kaj ne menciis la nomojn de ĉiuj niaj gastigantoj, gvidantoj, ĉiĉeronoj kaj amikoj, al kiuj mi estas tiom dankema pro iliaj zorgoj, bonvenigemo kaj amikeco. Unu tagon ĉirkaŭ monato post la alveno al Japanio mi konstatis, ke mi ne plu sentas min eksterlande, sed kvazaŭ reveninte hejme. Eble pro tio, ke la strato, en kiu mi naskiĝis, portis la nomon « Kioto », kaj tio ĉiam igis min scivolema pri la Lando de la Leviĝanta Suno, tiom malproksima al mi geografie, lingve kaj kulture, kaj pro tio Japanio, kaj aparte la mistera antikva ĉefurbo, Kioto, tiom altiras min kaj sentiĝas komforte

kaj hejmece. Mi scias, ke mi iam revenos... kaj nepre daŭrigos mian japanan serion !



Pripensoj de ne-Esperantisto

Silvano La Lacerto Auclair

Un musicien colombien explique pourquoi il a appris le sambahsa-mundialect plutôt que l'espéranto comme langue auxiliaire internationale.

Antaŭ kelkaj semajnoj mi eksciis pri nova blogo de nova parolanto de Sambahsa-Mundialect (legu pri tiu lingvo en la 104-a numero de [La Riverego](#)), Martín Rincón Botero. Tiu Kolombiano nun loĝanta en Germanio interesiĝis pri pluraj internaciaj planlingvoj, interalie kompreneble Esperanto, sed fine trovis Lingwa-n de planeta kaj Sambahsa-n pli taŭgaj por siaj bezonoj. Kvankam li ekkonis Samahsa-n nur en pasinta decembro, li jam tradukis poemojn kaj kanzonojn, kaj eĉ ektradukis romanon !

Tio igis min pensi, ke Esperanto nun troviĝas en tute nova situacio. Dum pli ol jarcento, ĝi estis la sola internacia planlingvo, pri kiu oni ĝenerale sciis. Eble konkuris kun ĝi nur Interlingua, sed nur ĝis iu grado kaj dum mallonga tempo. En la menso de preskaŭ ĉiuj kleraj homoj,



Esperanto estis LA internacia planlingvo, punkto, fino. Sed, de kelkaj jardekoj, konstruitaj lingvoj svarmas. Homoj lernas kvenjan (el la *Lordo de la Ringoj*), la klingonan (el *Star Trek*) aŭ la na'vian (el *Avatar*), kaj Interreto ebligas rapidan informadon

pri jam mortintaj lingvoj (kiel Interlingua, Occidental kaj eĉ Volapük) kaj diskonigon de novaj projektoj (kiel Lingwa de Planeta, Sambahsa-Mundialect aŭ Uropi). Iuj eĉ kreas lingvojn por plezuro, sen vera deziro diskonigi ilin, kiel iuj iam kolektis poŝtmarkojn. Homoj povas nun kompari la diversajn trajtojn de tiuj lingvoj kaj konkludi, ke Esperanto ne taŭgas. Malgraŭ la movado,

malgraŭ la literaturo, malgraŭ la Pasporta Servo...

Kion Martín Botero riproĉis al Esperanto ? Ĉefetion, ke ĝi transformas la muzikajn terminojn kaj

nomojn de muzikiloj, jam ĝenerale diskonatajn, ĉar italdevenajn, por adapti ilin al rigidaj ortografiaj reguloj. Fakte, Esperantistoj riproĉas pli-malpli la saman al Volapük. En Sambahsa, ekzemple, la vorto *pizzicato* tute regule prononciĝas kiel en la itala. Krome, Sambahsa havas pli mallongajn vortojn kaj eble pli riĉan vorttrezoron ol Esperanto, kio plaĉas al lia poeta sento.

Jen lia teksto. Tradukita kun permeso.

Lingvo sen timo

Mi ŝatus hodiaŭ skribi miajn ideojn pri internaciaj planlingvoj, pri miaj spertoj kun ili kaj pri la problemoj, kiujn mi trovis en la procezo. En antaŭa artikolo, mi skribis en Lingwa de Planeta pri miaj spertoj ĝis tiu punkto. Mi parolis pri miaj unuaj kontaktoj kun Esperanto, Ido, kaj poste Lidepla [Lingwa de Planeta]. En la lastatempaj tagoj mi ankaŭ konsideris la Interlingua-mondon kaj, post multa pripenso, mi havas iujn personajn konkludojn rilate la internaciajn lingvojn kaj iliajn praktikajn



Col legno aŭ Per la ligno ?

limojn. Nuntempe mi ne havas intereson en Esperanto aŭ Ido. La kialo pro tio estas, ke mi ne trovis propran akcepton de teknika terminaro por la muzika metio. Indas menciigi ĉi tie, ke mi ankaŭ ne akceptis la Lideplan sistemon rilate kun teknika kaj formala lingvo. Tamen, mi plu parolas la Lideplan, kaj ĝi estas projekto ankoraŭ kara al mi.

Kiel komponisto mi ĉiam havadis la ideon ke ni, muzikistoj, bezonas internacian planlingvon por nia profesio. Antaŭe la latina havis tiun funkcion, kun pluraj voĉaj verkoj verkitaj kun teksto en la latina. Eĉ nuntempe oni povas trovi, je malpli granda amplekso, komponaĵojn de tia stilo.

Tamen, la angla havas nuntempe la rolon de « lingua franca ». Partituroj, laborgrupoj kaj tiel plu estas farataj en la angla. Multa muziko estas ankaŭ skribita en la angla, ne unike pro la usona « imperiismo », sed ankaŭ ĉar ĝi estas fonetike tre interesa lingvo. La angla estas lingvo, kiu povas soni preskaŭ malprofunda, sed ĝi

ankaŭ estas tre bela lingvo, kiu povas esprimi la plej profundajn sentojn de homoj per pli dolĉaj kaj kompaktaj vortoj kaj riĉa vorttrezoro. Kvankam ĝia gramatiko estas « facila » kompare kun aliaj lingvoj,

kiel la hispana, iu tamen povas profunde soni kaj skribi. Se iu uzas la anglan por verki pri muziko, tiu tamen povas skribi la teknikajn vortojn sen problemo, kiuj ĉefe devenas el la itala. Ĝi estas bloke sufiĉe konvinka. Sed ĝi ankaŭ estas devigo. Kaj ĝi estas devigo, kun kiu mi (kaj certe la leganto) ne akordiĝas.

La angla sonas tre bone kiam parolata de siaj gepatraparolantoj. Ĝi iĝas pli bone skribita kiam skribita de siaj gepatraparolantoj. Ĝi estas lingvo, kiun oni kiel muzikisto devas uzi por konkursoj kaj interalie por kandidatiĝi al stipendioj. En Germanio, laborgrupoj estas en la angla, kvankam pluraj devas (aŭ, pli bone, ni devas) strebi por paroli la anglan, eĉ se malbone.

Pri ĉio ĉi oni povus diri, ke oni simple uzu iun ajn planlingvon, ekzemple Esperanton, kaj la problemo estas solvita. Tamen, mi opinias, ke la problemo estas pli kompleksa. Rezisto estas forta. Eĉ mi kontraŭas. Kial? Ĉar mi ne volus iun ajn internacian lingvon, interalie ne en mia profesio. Mi opinias, ke vera internacia lingvo devas sufiĉe bone uziĝi ankaŭ en la teknika (aŭ kiel teknika) lingvo, kaj ne unike en la flughaveno aŭ por esprimi bazajn pensojn. Tio estas, en mia opinio, unu el la plej gravaj problemoj por adopti planlingvon kiel internacian lingvon. Mi ne opinias, ke tia aprobo devas esti la volo de la registaroj de la mondo, sed devas esti nia volo. Oni devas rajti uzi lingvon sen timo. Eĉ en sia propra

profesio. Mi jam indikis Sambahsan al kelkaj personoj en mia fakultato, kaj mi verkis partituron por la Kvaropo Boreas en Bremeno uzante tiun lingvon plie al la germana. La nomoj de la instrumentoj ne ŝajnas strangaj, kaj la teknika lingvo povas konvinke uziĝi, sen ke iu devu lerni (kaj, pli grave, prikonsenti) novan simpligitan ortografion por la instrumentoj aŭ por la teknikaj vortoj, kiuj havas jam de jarcentoj fiksitajn ortografion (ekzemple « pizzicato » aŭ « col legno » kaj tiel plu).

En tiu punkto ankaŭ Interlingua ŝajnas tute bona kandidato. La alia avantaĝo de tiu lingvo estas, ke ĝi jam povas esti komprenata de vasta komunumo de parolantoj (inkludante min mem) sen antaŭa lerno. La malavantaĝo estas, ke ĝi ne ŝajnas vere internacia. Ĝi ne postulas, ke la gepatraparolantoj de latinida lingvo (kiel mi) renkontiĝu kun alia lingvofamilio. Mi opinias, ke vere internacia kulturo admonu la homojn esplori la mondon. Kaj internacia lingvo devus en mia opinio ankaŭ esti la rezulto de esploro de la antaŭaj generacioj kaj de ilia praktika realeco eĉ en la plej kompleksa homa sfero.

Martín Rincón Botero

Oni povas legi (kaj eĉ aŭdi !) tiun tekston en la originala Sambahsa versio ĉe martinsambahsa.blogspot.de/2015/02/bahsa-aun-baysa.html



Sovaĝaj bestoj

Francisko Lorrain



Texte humoristique, dans lequel un centenaire explique ses inquiétudes quant à l'avenir de l'humanité...

Centjara fariĝis mi hodiaŭ. Dio mia ! La vivo belas, sed... Pluras la sed-oj, fakte. Dank' al la Kosmo, mia edzino daŭre vivas kaj fartas preskaŭ same bone kiel mi. Tamen ege maltrankviligas min la eblo, ke ŝi povus morti antaŭ mi. Mi dubas, ke mi povus elturniĝi sen ŝi. Nur por prepari manĝojn, ekzemple. Mi ja povus aĉeti jam preparitajn manĝojn, sed mi timas la neceson varmigi ilin. En la kuirejo mi estas katastrofo kaj pruvita stultulo. Mi nur imagas min serĉanta kaserolon aŭ poton por boligi akvon. Mi aŭdus la voĉon de mia karmemora, komentanta eltranse miajn klopodojn : « Ne tiun, Ernesto, ĝi estas por supo. Prenu la malgrandan bluan malantaŭ la ruĝa poto — ĝi sufiĉos por

nur unu taso da teo. Ne, fakte prefereprenu la verdan, en la tirkesto sub la kuirforno. Ho, ĝi ne tieas ? Kien do vi metis ĝin lastfoje, kaduka malordulo ? » Kaj tiel plu. Koŝmaro. Nu, mi ja povus reedziĝi. Lastsemajne mi vidis en la apoteko vere plaĉan okdek-kvin-jaran junulinon. Mi estus tentata. Sed ne. Unue mi

konsiderus devon iel enamiĝi al ŝi. Komplike. Kaj ŝi prezentus al mi siajn gefratojn, gefilojn, genevojn, genepojn kaj la tuutan familieeegon... Aj ! Tion mi preferus eviti. Krome, cele al serioza konsekro de nia kuniĝo, ni devus almenaŭ unufoje amori. Tian printempulinon mi devus provi almenaŭ minimume kontentigi... Sed je mia aĝo,



tia manovro fariĝas ne nur hazarda, sed ankaŭ pena, eĉ pereiga. Ne, finfine, mi dungus kuiristinon — aŭ kuiriston, egale. Mi vivus pli solece, sed pli kviete.

Mi demandas min, kio okazus al ni, la viroj, se iun tagon ĉiuj virinoj forpasus, pro iu malsano trafanta nur ilin. Instanta katastrofo por la tuta viraro, mi certegas ! Mi demandis al mia edzino :

« Kion vi, la virinoj, farus, se iutage la tuta viraro formortus ? Vi havus neniun por meti eksteren la rubaĵojn, porti la valizojn, militi, ktp. Eee ! Malfacila fariĝus via vivo ! » Kaj mi daŭrigis, pli kaj pli ekscitiĝante. Ŝi silentis. Post momento ŝi diris : « Traaankviliĝu, Enĉjo. Kiel tio povus esti problemo ? Ni simple malsovaĝigus alian beston ! »

Tri novaj tradukoj de Alico en Mirlando

Silvano La Lacerto Auclair

Aperis antaŭnelonge tradukoj de *Alice in Wonderland* en tri novaj projektoj de internaciaj planlingvoj, kaj unu pli en renaskita projekto. En Sambahsa : *la Aventures as Alice in Daumsenland* ; en Lingwa de Planeta : *Alisa-ney Aventuras in Divalanda* ; en Lingua Franca Nova : *La aventuras de Alisia en la pais de mervelias* ; kaj en Neo (ia reformita Esperanto kreita en la kvindekaj jaroj) : *L'Aventuros d'Alis in Marvoland*.

Vi povos trovi kaj aĉeti ilin, kune kun pluregaj aliaj tradukoj (kiel en la hungara : *Aliz kalandjai Cso-daországban*, aŭ en la zulua : *U-Alice Ezweni Lezimanga* ; sed ankaŭ en la nord-orienta skota : *Ailice's Anters in Ferlielann* ; en picard borain : *Lès-Aventûres d'Alice ô Pèyis dès Mèrvèy* ; aŭ en la latina : *Alicia in Terrā Mīrābilī*) kaj kun diversaj alifabetigoj de la angla, je la jena retejo : www.evertype.com/carrolliana.html.



Malpli oftaj fundamentaj vortoj (Parto 3)

Francisko Lorrain

Iam kaj tiam oni renkontas fundamentan radikon, kiun ni povus pli ofte uzi. Jen la tria ero de kroniko prezentanta ĉiufoje kelkajn malpli ofte uzatajn fundamentajn radikojn. La difinoj kaj ekzemploj estas ĉerpitaj el *La nova plena ilustrita vortaro de Esperanto* (Paris, Sennacieca Asocio Tutmonda), kiu markas ĉiujn fundamentajn vortojn per stelo ★. Komentoj miaj aperas inter rektaj krampoj []. Alta ^Z indikas zamenhofan citaĵon aŭ vorton, alta ^B citaĵon de K. Bein (« Kabe »).




★ **arleken/o** (ankaŭ majuskle) Gaja burleskulo, origine rolulo en la itala komedio, konebla per sia multpeca bunta vesto : *la morto estas io pli, ol salto de ~o !^Z*. ☞ [★] *klaŭno, pajaco, pieroto, pulĉinelo, Kolombino*. ~i (ntr) Diri mallertajn ŝercojn, ridigajn

stultaĵojn : *penu plaĉi al ŝi, sed ne ~u, estu serioza^B*. ☞ [★] *afekti, petoli*. ~aĵo. Ridinda, intence mallerta diro aŭ ago.

★ balustrad/o 1

Vico da balustroj kun supra breto, ĉe la rando de teraso, balkono ks. 2 Ĉia analoga barilo aŭ apogilo, starigita por eviti defalon : ~o de ŝtuparo^Z, de ferdeko.



☞ [★] *apogrelo, manrelo, parapeto*.



★ **barbir/o**. Tiu, kiu metie razas aŭ tondas barbon kaj kapharojn. ☞ [★] *frizisto, kombisto, razisto*.

★ **barĉ/o**. Ukraindevena acideta supo el betoj.



Mongolio, mia amo !

L'hiver 2010 a frappé la Mongolie particulièrement durement, avec des températures de moins 40 ou moins 50 degrés. Pour aider des familles qui ont perdu leur bétail et leurs biens et qui n'ont pas encore retrouvé leur vie normale, Yasuo Tabuchi, avec d'autres membres d'Oomoto, a visité le pays pour construire des ger (maisons traditionnelles), pour les donner à deux familles dans le besoin.

Yasuo Tabuchi



Yasuo Tabuchi estas jam konata al niaj legantoj, kiuj eble memoras artikolon pri la Israel-Palestina pacprojekto, en kiu jam de jaroj aktivas s-ro Tabuĉi (vidu [La Riveregon 115](#)). Pasintsomere li partoprenis en jen plia bonega internacia projekto de Oomoto, ĉi-foje, en Mongolio. (Red.)

La sopirata lando

Mongolio, Koreio kaj Japanio ! Ĉu vi konas la komunan punkton inter la beboj el tiuj tri landoj ? Jes ! Prave dirite ! Ĝi estas la « mongola makulo » sur sidvangoj de beboj.* La tri landoj ankaŭ havas komunan punkton pri lingvoj : ĉiuj tri estas aglutinaj lingvoj, kaj ankaŭ la vizaĝoj de la popoloj estas similaj. Pro tio mi sentis intimecon al



Mongolio. Mi imagis, ke, probable, miaj foraj prapatroj venis al Japanio tra Koreio el la mongola herbejo. Tial Mongolio estis mia aspirata lando dum multaj jaroj, kaj, finfine, somere 2014, mia revo viziti la landon de miaj revoj realiĝis !

Pasintsomere 11 Oomotanoj partoprenis en la Somera Kampado en Mongolio. Ni restis tie dum ses tagoj, ĝuante la vivon en tiu herbeja lando. En la aviadilo al Ulanbatoro mi demandis al s-ino Kumiko lida, kiu partoprenis la kampadon ankaŭ en la antaŭa jaro : « Kial vi ankaŭ ĉi-jare partoprenas en la kampado ? » Ŝi respondis : « Verdire, tuj post mia reveno hejmen mi pensis, ke mi neniam revizitos Mongolion ! Sed ĉi-jare mi sentis, ke Mongolio atendas min ! Estas tre strange ! » Aŭdinte ŝian respondon, mi demandis min : « Kio do estas la ĉarmo de tiu ĉi lando?.. »

Konstrui, volontuli, ĉevalrajdi !

La Oomotana karavano havis kvar celojn. La unua celo estis konstrui gerojn — la tradiciajn mongolajn domojn — kaj donaci ilin al familioj sen domoj.

La dua celo estis partopreni en volontula agado, vizitante la distrikton *Songino Ĥairĥan* en Ulanbatoro. En ĉi tiu distrikto loĝas malriĉaj homoj laborantaj en malfacilaj kondiĉoj. Multaj el ili estas nomadoj, kiu perdis siajn hejmojn kaj dombestojn.**

La tria celo estas ĝui la ĉevalrajdadon. La ĉevalrajdado estis la unua sperto por mi, do, mi timis vundiĝi pro falado — sed mi ĝuis ĉevalrajdon. La okuloj de la ĉevalo estis mildaj. Mi amas ĉevalrajdon nun !



En la kampadejo por turistoj

La kvara celo estis viziti Erdenizo-Templon kaj renkontiĝi kun junaj estontaj bonzoj. Ni vizitis la lernejon de Erdenizo-Templo por eduki junajn bonzojn. La aĝo de la lernantoj estis inter 10 ĝis 24-25 (la plej aĝa studento finis postdiplomajn studojn en Hindio). En la lernejo ili studas budhismon, sed ankaŭ ĝeneralajn studobjektojn, kiel matematikon, sciencojn, la anglan kaj la mongolan lingvojn. Ili tre atendis nian viziton, kaj eĉ se komence ili estis timidaj, ili aspektis tre feliĉaj, kiam oomotanaj junuloj donacis al ili skribilojn kaj ludilojn.

Kio donis al mi gandan kortuŝon ?

1) La volontula agado kaj renkontiĝoj kun homoj kun varma koro

En la distrikto *Songino Hairhan* ni konstruis du gerojn kaj donacis ilin al familioj sen domoj. La ricevintoj treege ĝojis !

Post la konstruado ni vizitis alian lokon, kie la familio de s-ino Sarnae, la ricevinto de la gero,

kiun la Oomoto-karavananoj konstruis kaj donacis antaŭ kvar jaroj. La patrino diris : « Danke al la gero donacita de Oomoto, la bazo de nia vivo stabiligis ; la unua filo ricevis laboron. Kaj unu tagon mi trovis bebon forĵetitan en la rubejo. Mi prenis ŝin al mia hejmo kaj kreskigis ŝin. Se ne estus la gero, mi ne povus fari tion. Mi tre tre ĝojas kaj dankas vin pro via bonfaro. » Ni estis kortuŝitaj, ĉar ni reale sentis, ke nia volontula agado tre bone funkcias, donante ĝojon kaj feliĉon al la Mongoloj.

Poste ni vizitis komunumon, kie loĝas malfavorataj homoj.

Multaj estas la nomadaj migrantoj el la herbejo. Antaŭ kelkaj jaroj okazis katastrofo kaŭzita de la neĝego, kaj multaj nomadoj perdis domojn, ŝafojn, ĉevalojn kaj kaprojn. Ili estis devigitaj enmigri en la ĉefurbon, Ulanbatoron, kaj vivi en malfacilaj kondiĉoj ; malfacila afero estas trovi



Junaj lernantoj de Budhismo



Geknaboj ricevis skribilojn kun rideto

laboron por vivteni sin ! Tie ni renkontis anojn de neprofitcelaj organizaĵoj kaj Mongolojn kun alta aspiro, kiuj helpas la homojn en malfacilaj kondiĉoj. Ĉeestis ankaŭ membro de la Japana Internacia Kooperado Asocio, s-ino Waŝimine. Mi renkontis ankaŭ s-inon Sorongo, mongolan kuracisitinon nun

studentan en Jamagata-Universitato en Japanio : ŝi donacis vitaminojn kaj ŝtrumpetojn al la geknaboj. Vere, kiam malfeliĉo atakas popolon, tiam aperas homoj, kiuj helpas kaj subtenas la malbonŝanculojn. En Mongolio troviĝas multaj homoj kun varma koro, kaj mi estis kortuŝita renkontiĝi kun tiaj homoj. Ili donas al mi bonegan modelon de valora vivo.

2) Vasta kampo kaj steloj, kiuj atendis nin

Niaj amikoj-karavananoj ofte diris : « Ho, bonega kaj mirinde bela estas Mongolio ! Mi deziras resti plu ĉi tie ! » Nia vivo en Japanio estas plenplena je streĉoj, sed vastega herbo, freŝa aero, ĉevaloj,

safoj, kaproj donis al ni trankviligan ripozon.

Ni tranoktis en gero dum tri tagoj de nia vojaĝo. Kiam mi vekigis noktomeze kaj eliris el la gero, mi vidis multegajn, nekalkuleblajn stelojn. La steloj rigardis nin el la nokta ĉielo kun ĉarma rideto. Ĉar Ulanbatoro havas altitudon de ĉirkaŭ 1300

metroj, mi sentis la stelojn tre proksimaj de mi. Ili aspektis, kvazaŭ tuj baldaŭ ili ekfalus !

3) Renkontiĝo kun esperantistoj

Revido kun esperantistoj estas plenplena de rememoroj ! Toja-san kaj Ayura-san duope vizitis Kameoka-n en 2010 kaj restis ĉirkaŭ tri monatojn en Kansajo. Toja estas mirinda pianisto, premi-

gajninto de « Chopin-konkurso » por gejunuloj. Ayura-san tiam estis studentino, kiu studis la japanan lingvon en Mongola Nacia Universitato. Ili vojaĝis en Kansajo por havi piano-koncertojn en Kameoka, Kioto, Osako, Kobe kaj Himeĵi. Ĉar mi laboras en Kobe, oomotanaj geamikoj en Kobe organizis piano-koncerton en Chopin-Halo en



S-ro Tabuchi kaj la infanoj de la familio, kiu ricevis geron

Sannomiya. Toja ludis pianon brile kaj ankaŭ geknaboj ludis pianon bonege. Post la koncerto Toja kuraĝigis la promesplenajn junajn pianistojn. La geknaboj tre ĝojis kaj estis ekscititaj renkontiĝi kun ŝi. Ayura bele prezidis la koncerton en sia bona japana lingvo.

Ili estis varme akceptitaj en Kansajo kaj ĝojis pro la renkontiĝo kun lokaj Oomotanoj, esperantistoj kaj junaj pianistoj. Ili ankaŭ ĝuis turismon, butikumadon, manĝadon kaj naĝadon en la maro : la unuan fojon en sia vivo ! Kvankam tajfuno tiam alproksimiĝis kaj la ondado estis iom alta, ili provis naĝi (aŭ, pli ĝuste, ili ludis per la akvo kaj la ondoj !). Post la revido en Ulanbatoro ni parolis pri la koncerto en Kobe kaj la naĝado en Himeĝi. Ili havas laboron post la diplomiĝo de universitatoj, sed ili volonte partoprenis en la volontula agado kune kun ni, preninte libertagojn. Mi estis tre feliĉa.

Alia esperantisto, kiun mi plezure revidis, estas s-ro Enkhee, kiu partoprenis la UK-on en Jokohamo kaj la postkongresan eventon « Bonvenon al

Oomoto » en 2007. La unua Oomotano en Mongolio, en 2009 li plenumis la rolon de la respondeculo de la Azia Kongreso en Ulanbatoro kaj pasintaŭguste li partoprenis en Aktivul-Maturiga trejnado de UEA en Ŝijano, Ĉinio, instruante Esperanton. Ni ĝojis pri la revido. La renkontiĝo kun la lokaj esperantistoj estis impresplena. Dezirante nian rerenkontiĝon en Esperantujo, ni adiaŭis.

Do, koran dankon, Mongolio kaj la Mongolaj amikoj. Mi certe vizitos vin en la baldaŭa estonteco ! « *Ih bajarlala!* »



Kun Toja kaj Ayura

* La « mongola makulo », aŭ « mongola blua makulo », estas naskiĝmarko de diversaj orient-aziaj popoloj, sed oni renkontas ĝin ankaŭ en aliaj mondopartoj (ekzemple, ĉe indiĝenoj de Amerikoj, Oceanio kaj Polinezio). Ĝi malaperas kutime je la aĝo de 3-5 jaroj. — Red., laŭ Vikipedio

** Dum la vintro 2009-2010, ĉ. 80% de la lando estis kovrita per 20-60 cm da neĝo, kaj la ekstrem-malvarmega temperaturo de minus 40 ĝis minus 50 gradoj celsiusaj daŭris dum preskaŭ du monatoj. Ĉirkaŭ kvinono de ĉiuj paŝt-bestoj pereis en la malvarmego, kaj multaj paŝtistaj familioj, perdinte ĉiujn siajn havaĵojn kaj bestojn en la malvarmego (*zud*), estis pelitaj al la ĉefurbo. — Red., laŭ Vikipedio

Esperanto-renkontiĝoj

16-18-a de majo 2015 : 12-a MeKaRo

Toronto, Ontario

30-a de junio — 9-a de julio 2015 : NASK

Raleigh, NC

17-25-a de julio 2015 : 48-a konferenco de ILEI

Oostende, Belgio

25-a de julio — 1-a de aŭgusto 2015 : 100-a UK

Lille, Francio

2-8-a de aŭgusto 2015 : 71-a IJK

Wiesbaden, Germanio

10-12-a de oktobro 2015 : ARE

Silver Bay, NY

21-23-a de majo 2016: 13-a MEKARO

Granby, Kebekio

Montrealaj Esperanto-Kunvenoj (MEK)

Vendredo, 24-a de aprilo 2015 : NOVA LOKO ! *Le Pèlerin Magellan* (330 Rue Ontario E, Montréal, QC)

Vendredo, 29-a de majo 2015 ĉe Resto Végo St-Denis

Vendredo, 12-a de junio 2015 ĉe Resto Végo St-Denis

Vendredo, 11-a de septembro 2015 : jarkunveno ĉe Resto Végo St-Denis

Vendredo, 25-a de septembro 2015 ĉe Resto Végo St-Denis

Vendredo, 30-a de oktobro 2015 ĉe Resto Végo St-Denis

Vendredo, 13-a de novembro 2015 ĉe Resto Végo St-Denis

* Noto : manĝo je la 18 h , babilado ekde 19:30 h. Pli pri la horaro : ĉe <http://www.esperanto.qc.ca/eo/activites>. **Resto Végo St-Denis (restaurant végétarien)** : 1720, rue St-Denis (entre de Maisonneuve et Ontario, métro « Berri-UQAM »).

Esperanto-Societo Kebekia | Société québécoise d'espéranto

La Riverego estas eldonata de la Esperanto-Societo Kebekia kvarfoje dum la jaro : marte, junie, septembre kaj decembre. Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem. Oni rajtas kopii la artikolojn, kun nepra indiko de la fonto. Senpage por la membroj de la ESK. UEA-kodo de la Societo: kebk-d.

Redaktado kaj grafiko : Yevgeniya Amis (riverego(ce)esperanto.qc.ca). **Korektado kaj lingva konsilado** : Silvano Auclair, Francisko Lorrain kaj Joel Amis. **Estraranoj de ESK** : Normand Fleury (prezidanto), Suzanne Roy (vic-prezidanto), Sylvain Auclair (sekretario-kasisto), Nicolas Viau (konsilanto), Joel Amis (konsilanto).

La Riverego (Le Fleuve) est publié par la Société québécoise d'espéranto quatre fois par année, en mars, juin, septembre et décembre. Dépôts légaux aux Bibliothèques nationales du Canada et du Québec. Premier trimestre 1986. ISSN 1923-1067. Le contenu des articles est sous la responsabilité des auteurs. La reproduction des articles est permise, avec mention obligatoire de la source. Gratuit pour les membres de la Société québécoise d'espéranto.

Rédaction et graphisme : Yevgeniya Amis (riverego(à)esperanto.qc.ca). **Correction** : Sylvain Auclair, François Lorrain et Joel Amis. **Administrateurs de la SQE** : Normand Fleury (président), Suzanne Roy (vice-présidente), Sylvain Auclair (secrétaire et trésorier), Nicolas Viau (conseiller), Joel Amis (conseiller).

Limdato por la venonta eldono / Échéance pour le prochain numéro : 2015.05.20
3-3791, av. Linton • Montréal • H3S 1T3 | info(ĉe)esperanto.qc.ca • www.esperanto.qc.ca

En plus de la Société québécoise d'espéranto, il existe au Québec plusieurs clubs d'espéranto. Pour ajouter votre club à cette liste ou annoncer une activité, écrivez-nous à riverego(à)esperanto.qc.ca

Vizitu nian retejon !
Visitez notre site web !
www.esperanto.qc.ca

Pasporta Servo

Aliĝu tuj, se vi volas esti gastiganto kaj bonvenigi esperantistojn ĉe vi :
www.pasportaservo.org.
Vi povas ankaŭ kontakti
Ĵenja-n Amis
(yevgeniya.amis(ĉe)gmail.com), kiu estas la peranto por Kanado.

